



LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

Kosto de abono por jaro: Skandinavaj kronoj 4,00 — hungaraj kronoj 5,50 — frankoj 5,75 — rubloj 2,00 — germanaj markoj 4,50 — portugaliaj rejsoj 1200 — brazilaj rejsoj 2500 — dolaroj 1,25 — ŝilingoj 4 1/2.

Pago por anoncoj: 15 oeroj — 20 heleroj — 20 centimoj — 8 kopekoj — 15 pfenigoj por duonpaĝa petitolinio. — 10% rabato por duonjara, 25% rabato por tutjara anoncado; ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redakcio: **Paul Nylén**, en la redakcio de »Vårt Land«, **Stockholm**, Sverige (Svedujo). — Adreso de l' administracio: **Paul de Lengyel**, en **Szegvár**, Magyarország (Hungarujo). — Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la **redaktoro**; pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la **administranto**.

Ĝe fino antaŭ komenco.

Unu jaro estas pasinta en la novaj cirkonstancoj. Estinte antaŭe dum kelke da jaroj *sveduja* gazeto, nia »Lingvo Internacia« ŝanĝis sian hejmon kaj fariĝis *hungaruja*.

En kunligo kun la transloĝiĝo ĝia eksterajo iom estas aliformita. Multaj personoj esprimis sian aprobon, kelkaj eĉ sian ĉarmitecon pri ĝia nuna elvido, — unu kaj alia ĝin mallaŭdis.

Ni opinias, ke estas eksterordinare grava tio, ke la esperantistaro havas ian organon, kiu unuoble uzas la lingvon internacian, kaj ni jam substrekis, kiel la plej grandan meriton de la gazeto, tion, ke ĝi **ekzistas**.

Ciujn prijuĝojn pri la enhavo kaj eksterajo de la gazeto ni lasas al niaj legantoj, por ke ili formu ilin al si mem.

Ni uzas tiun ĉi okazon por peti de niaj paciencaj amikoj la pardonon pro tio, ke dum

la jam pasinta jaro ni ne povis atingi la ĝustan tempon de elirado. Tio dependis, unupartite, de la longa interspaco inter la redaktoro kaj la eldonanto — kaj, aliparte kaj plejmulte, de la malgrandeco de la presejo, kio kaŭzis ke nur po malgranda parto de la gazeto ĉiuporcie povis esti kompostata kaj presata.

Sekve de la postnuna pligrandigo de la presejo foriĝas jam tiu ĉi malfacilaĵo, tiel ke post nun ĉiu numero de la gazeto povas esti presata en iom da tagoj, — dum antaŭe por tio estis bezonaj kelke da semajnoj. Sekve, ni havas plenan esperon, ke baldaŭ la gazeto povos eliradi ne sole regule, sed ankaŭ akurate.

Ĉar grandnombro el niaj legantoj abonas samtempe „l' *Espérantiste*“, kaj ĉar tiu ĉi estas publikigata en la *fino* de ĉiu monato, ni penados dissendadi la »Lingvo Internacia«-n ĉiam en la *mezo* de l' monato.

En tiu ĉi kunteksto, — ĉar la redaktoro transloĝiĝis nun el Upsalo en Stokholmon, kie

Direktu atenton al la ŝanĝo de la adreso de l' redaktoro.

li havas la oficon de ĵurnalisto, — ni volas ankaŭ peti niajn abonantojn, ke ili volu turni sin pri ĉio tuŝanta la tekston de nia gazeto al *s-ro Paul Nylén*, en la redakcio de l' ĉiutaga politika gazeto „*Vårt Land*“, en *Stockholm*.

Plej varmkore ni dankas ĉiujn, kiuj montris en ia ajn maniero al la »L. I.« sian bonvolon en la jaro pasinta. Precipe ni alportas nian dankon al tiuj, kiuj liveris la enportojn de artikoloj kaj sciigoj. Ne ĉiuj artikoloj, kiujn oni sendis al ni, povis esti uzataj; kaj eble unu kaj alia verkinto sentis sin ofendita pri tio. La kaŭzo de rifuzo preskaŭ senescepte

estis tio, ke la lingva formo estis erara, kaj oni ja ne povus postuli de ni, ke ni devus korekti kaj ĉirkaŭlabori multon da verkoj presotaj en la nomo de diversaj verkintoj!

Samfoje kiam ni dankas pro la foririnta jaro, pro ĉia asableco kaj ĉia pardonemo, kiujn al ni donis vi, kara leganto, — samfoje ni deziras al vi por la nova jaro la plej riĉan mezuron da feliĉo kora, da paco animo, da sukceso en viaj faroj — ĉian bonon kaj benon.

Ankoraŭ unu! Neniam forgesu, ke du lingvoj estas viaj: la sankta lingvo de via patrino kaj la kara lingvo frata!

Esperanto vivu, floru, kreskadu!

La Redakcio.



Al la abonantoj de la „Lingvo Internacia“.

Tiu ĉi numero fermas la 1900-an jarkolekton kaj estas la lasta en la XIX. jarcento.

En la pli supraj linioj la redaktoro siavice jam parolis pri la malhelpoj de la akurata elirado de l' gazeto. Sed, krom la tie ditaj, grande malhelpas ĝin ankaŭ la *manko da mono*. Nia kaso ne estas tropleniĝita je trezoroj; ĝi ja bezonas havi akuratecon de la parto de niaj abonantoj. Inter ili ekzistas preskaŭ 100, kiuj dum la tuta jaro 1900 ne sendis abonmonon. Ni ne kalkulas je ia profito, kiam ni petas ilin, ke ili volu ensendi al ni la abonmonojn ŝuldajn, — kaj samtempe ni petas ĉiujn, kiuj volas resti fidelaj al nia gazeto ankaŭ en la jaro 1901, ke ili abonpagu ĉe ni kiel

eble plej baldaŭ, antaŭhelpante la pluan vivon kaj floradon de la »Lingvo Internacia«. Monon oni sendu senescepte al *s-ro Paul de Lengyel*, en *Szegvár* (Hungarujo). — La koston de la abono por niaj portugala kaj brazilaj amikoj ni devas iom pligrandigi (1200 portugala kaj 2500 brazilaj rejsoj anstataŭ 1000 kaj 2500, por ke ĝi egalu je la abonkosto de por alilandanoj.

Ĉiu vera esperantisto devas subteni nian komunan aferon per sia abono, ĉar ĉio dependas de la abonantoj. Malnovaj esperantistoj, disvastigu nian ideon laŭforte kaj varbu novajn abonantojn! sed antaŭ ĉio: ne forgesu aboni vi mem!

La Administracio.



PRI LA VERBIGADO EN ESPERANTO.

(Dua respondo al S-ro Kofman.)

Certe la punkto de la verbigado de l' adjektivoj ne tuŝas aferon esencan en Esperanto, sed el ĝi povas eliri pli-malpli da logikeco, klareco kaj komprenebleco en la lingvo. Pro tio ĝi havas, laŭ mia opinio, grandan gravecon en la praktika uzado Esperanto. La fakto frapis tre forte min kaj aliajn, kiam, la unuan fojon, S-ro Kofman elmontris sian proponon en la 12-a numero de *Lingvo Internacia* 1896. Pro tia verbigado kelkaj frazoj el la donitaj ekzemploj estis apenaŭ nekomprenblaj al mi mem, sen ia trograndigo. Tial mi tuj skribis longan leteron al S-ro Gernet, tiam redaktoro de tiu ĵurnalo; ĉar mi pensis ke aliaj povus, kiel mi, ne kompreni bone kaj klare similajn frazojn; tiom pli ke nenie en niaj lernolibroj — tion ĉi S-ro Kofman mem konfesas — estas dirate ke *i, as, is* k. t. p. signifas *esti, estas, estis*, kaj ke doktoro Zamenhof, en la tiel multaj tekstoj produktitaj de li, ne praktikas tian verbigadon. Sed la letero, pro kaŭzoj sendependaj de iu, ne estis publikigita.

Cetere, la motivoj, kiujn mi prezentis tiam, estis pli malpli la samaj, kiel en mia artikolo de aŭgusto lasta (vidu la 8-an numeron de *Lingvo Internacia* 1900).

La legantoj volu kompari la diritan artikolon kun tio, kion diris S-ro Kofman en la 6—7 kaj en la 10—11 numeroj de l' sama gazeto. Per la komparado de niaj motivoj ĉiu povos facile vidi, kie troviĝas la vero. Cetere, se mi tute aŭ *ec parte* eraris, mi akceptos *kun plezuro* la juĝon de doktoro Zamenhof, kaj estos la unua por proklami, ke mi trompiĝis. Sed tio ĉi tre surprizus min, ĉar mi inspiris min per la modeloj, kiujn li mem donis.

Nun ni faru amike kelkajn rimarketojn.

Mi skribis »Unue mi rimarkigos, ke S-ro Kofman, certe senintence, falsas *iom*, kion mi diris k. t. p.« La vorteto *iom*, kiu troviĝas en mia frazo, havas sian gravecon. Mia konstato celis ne la nombron de l' adjektivoj cititaj, sed precize tiun ĉi parton de l' frazo de S-ro Kofman „*kaj tiuj ĉi verboj (kuraĝi, avidi k. t. p.) signifas, laŭ la konfeso de l' aŭtoro, »esti kuraĝa«, «esti avida»* k. t. p. Efektive, mi rimarkigos, ke mi ne diris, ke »*kuraĝi*«, »*avidu*«, »*egali*«, »*avari*«, »*furiozi*« signifas »*esti kuraĝa*«, »*esti avida*«, »*esti egala*«, »*esti avara*«, »*esti furioza*«: sed mi *iom* pli bone, kvankam ne ankoraŭ sufiĉe precize, montris ilian signifon, dirante »*kuraĝi*« *havi la kuragon fari tion ĉi aŭ tion*; »*avidu*« *esti avida je* (ekz.: *avidu gloron*); »*avari*« *esti avara pri . . . doni ion avare* (ekz.: *ne avaru vian penon*): »*furiozi*« *esti en la stato de furiozeco*. La franca linio respondanta klarigas ankoraŭ pli multe mian penson kaj sinjoro Kofman posedas tro bone la lingvon francan por nescii, ke estas granda diferenco inter »*être avare*«, »*être avide*« kaj la esprimoj »*être avare de*«, »*être avide de*«. Sendube la vorto *esti* troviĝas en la traduko, sed ĉiu facile komprenas, *precipe per la ekzemploj aldonitaj*, ke tiu ĉi verbo donas klarigon, sed ne estas citita kiel plene ĝusta traduko de l' verboj *avari, avidi* k. t. p. Mi do povis tre ĝuste pretendi ne ke S-ro Kofman falsis mian penson, sed ke li *certe senintence* falsis *iom*, kion mi diris.

Nun la leganto vidos pli bone ke, en mia artikolo de aŭgusto, kritikita de S-ro Kofman en la »*Lingvo Internacia*« de oktobro-

novembro, mi ne ŝanĝis mian opinion. Mi nur fariĝis pli preciza.

La diversaj klarigoj kiujn mi donis en ĝi pri la vortoj *rapidi*, *perfidu*, *malkvietu*, *lami*, *ruzi*, *kuragi*, *avidi*, *egali*, *avari*, ŝajnas al mi esti ĝustaj, 1^o ĉar ili estas tute konformaj je la sencoj de l' verboj rusaj al kiuj ili respondas en la plena vortaro rusa-internacia; 2^o ĉar ili estas konformaj je la modeloj, kiujn al ni donis doktoro Zamenhof en l' »Esperantisto« kaj en ĉiuj s'aj verkoj.

Kiam mi skribis por Francoj *speciale* la artikolon de l' *Espérantiste* celitan de S-ro Kofman, mi nur intencis doni la adjektivojn esperantajn, el kiuj per *i*, *as* k. t. p. oni *ordinare* faras verbojn. Tiam mi ne precize kaj tiel funde esploris la nunan demandon kiel en mia respondo al S-ro Kofman. Sed por tiu ĉi respondo, serĉi te en la Vortaro rusa-internacia ĉiun verbon cititan, mi severe precizigis la sencon, kiel la leganto povos konstati sur la paĝoj 102 kaj 103 de Lingvo Internacia (1900); mi diris ekzemple ke *avidi* signifas *convoyer* (france), ke *egali* signifas *s' égalier* k. t. p. Tio ĉi klarigas kion S-ro Kofman nomas »mia nova opinio«.

Se mi ne estis sufiĉe preciza en la artikolo de l' *Espérantiste*, ŝajnas al mi ke mi sufiĉe korektis la aferon en mia respondo, ĉar tiam mi fundamente esploris punkton, kiun mi nur tuŝetis en l' *Espérantiste*. Cetere, eĉ se mi konsentus, ke mi, en la respondo, esprimis novan opinion, tiu ĉi nova opinio estas fondita sur la serĉado preciza de ĉiuj adjektivoj verbigitaj en la vortaro rusa-internacia; kaj el tiu serĉado rezultis por mi la certigo ke doktoro Zamenhof ne donis al *i*, *as* k. t. p. la signifon *esti*, *estas* k. t. p. Neniam ankaŭ mi vidis lin, nek en prozo, nek en *poezio* uzantan, sen ia radiko, *i*, *as*, *is*, *anta* k. t. p.

Pri la vorto »sani« mi tekste diris: „*la formo duvorta »esti malsana« tradukas verbon rusan, kiu esprimas unuvorte la saman ideon. Sed precize, ĉu tiu formo, ne supozigas ke »sani« ne signifas tute ĝuste »esti sana«? Ĉar se »sani« havus precize tian signifon, ĉu la ideo mala ne estus esprimita per »malsani«? Sed eĉ se estus pruvite ke »sani« signifas tute ĝuste la saman ideon kiel »esti sana«, ĉu el tio rezultus ke i signifas esti? Estas do kelka diferenco inter mia diro kaj la citaĵo de S-ro Kofman, ĉar la »tute ĝuste« de mia frazo ŝanĝas iom la tekston kaj la fina supozo ŝanĝas tre multe la ideon.*

Tre certe »kuraĝi« en multaj okazoj signifas *oser*. Ekzemple: *mi kuragas diri, ke vi estas malprava*; france: *j' ose dire que vous avez tort. Faru do tion, se vi kuragos*; france: *faites-le donc, si vous l'osez*.

Laŭ mia opinio, la paragrafo antaŭlasta de s-ro Kofman enhavas eraron. Kiam ni diras france: »je suis tombé«, la ideo de *esto* ne troviĝas du fojojn en la frazo: ĉar ĉiu Franco sentas kaj scias, ke tie li devus diri »j' ai tombé« (*j' ai fait l' action de tomber*) *mi falis*, por esti logika. En lia penso *tie* la verbo *esti* (*je suis*) signifas *havi*. Sed la participo »tombé« tie ĉi ankaŭ prezentas la sencon »falinta« *kiu faris la agon fali, kiu falis*. Sekve en realeco la ideo „*esti*“ ne estas eĉ unu fojon en la frazo.

Se, sur la paĝo 53^a de l' *Commentaire sur la grammaire Esperanto*, verko ekzaminata de doktoro Zamenhof en ĉiu detalo, mi diras »mi estis estinta, mi estus estinta« k. t. p., tio ĉi prezentas naturan sekvon de la *logika* konjugacio de l' verbo »esti« per si mem, kiel en la lingvo germana. Se mi diras »kiam li mortis, li neniam estis estinta malsana«, tio ĉi signifas »li neniam antaŭe estis estanta mal-

sana. • Bezonante signi *du* tempojn diferencajn de estado, kompreneble mi uzas du fojojn la vorton *est*. Sed tio ĉi neniel pruvas ke *i, as* k. t. p. havas apartan signifon en la verboj faritaj el radikvorto adjektiva. Tio ĉi neniel pruvas ke nur ekzistas verboj de stato. Fine tio ĉi ne detruas kion mi diris en la tuta artikolo kaj precipe en la paragrafo pri kiu respondas S-ro Kofman en sia antaŭlasta paragrafo.

Aliparte ŝajnas al mi, ke post la klarigo supre donita, oni ne povas diri ke mi restas en la »dualismo« pri kiu parolas S-ro Kofman;

dum li konfesas mem ke li »toleras la *Tricon*« kritikitan en mia artikolo, kaj juĝitan tie nelogika. Laŭ mia opinio tio ĉi sufiĉas por montri, ke li ne estas prava, ĉar oni ne povas akcepti, ke per la konstruo de sia lingvo, doktoro Zamenhof enmetis tri fojojn la ideon de »esto« en ĉiun verbon pasivan.

Cetere pri ĉio la amikoj legu, komparu kaj juĝu; ili havas ĉiujn elementojn por tio. Estus tede kaj senutile plilongigi ankoraŭ la analizon de l' demando.

L. de Beaufront.



PENSOJ ĈE LA KREPUSKA KAMENFAJRO.

En dana gazeto trovis **P. Nu.**

Estas facile malestimi, sed kompreni estas multe pli bone.

Nur fosu profunde, kaj vi trovos akvon fluanta sub ĉiu peco da tero, malĝojon riveradi sub la supraĵo de ĉiu homa vivo.

Estas tagoj, kiam vi perdas el la manoj ĉion, kion vi kaptas, kaj estas ankaŭ tagoj, en kiuj via animo eĉ ne povas ion kapti, nenian difineblan penson, nenian decidon. Estu pacienca, lasu tiajn tagojn preterpasi. Via kaptemeco, via streĉpovo kaj firmeco, korpa kiel spirita, certe revenos.

La leĝo por la fidelaj amikecoj estas tiu ĉi: oni komencas per altiriĝo pro la parencaĵo; poste pli-malpli forta apogado sin trovas dank' al la diferencoj aŭ

ombroflankoj, kiujn oni eltrovas, kaj nur tiam, kiam tio estas trapasita, povas fariĝi firma kaj daŭranta kuniĝo.

La homaj aferoj devas esti konataj por esti amataj, la diaj devas esti amataj por esti konataj.

La unua leĝo de l' amikeco devas esti, ke ĝi venu el la tuta koro kaj ke vi dividu kaj la bonon kaj la malbonon kun tiu, kiun ĝi trafas. Tiu delikateco, ke oni volas tenadi por si mem tiun kaj tiun ĉi malĝojon por ŝpari sian amikon, estas pleje maljunvirinaĵo. Ĉar precize por tio li estas via amiko, por ke li eniru sub la ŝarĝon kaj levu ĝin de viaj ŝultroj. Se via amiko havas en si ion, kio ne taŭgas, vi ne kaŝu al li tion, kaj ne senkulpigu tion al li mem. Sed al la tria homo vi kaŝu kaj senkulpigu ĝin.



ROZO.

(De I. S. Turgenjev.)

Lastaj tagoj de aŭgusto . . . L' aŭtuno jam estis surpaŝanta.

La suno subiradis. Subita ventega pluvego sen tondro kaj sen fulmoj ĵus ekkuris rapidege super nia larĝa ebenaĵo.

La ĝardeno antaŭ la domo estis flamanta kaj fumiganta, tuta superverŝita per brulo de l' ĉielruĝo kaj superakvego de l' pluvo.

Si estis sidanta apud tablo en la gastĉambro kaj kun profunda enpensado rigardadis la ĝardenon tra la duone malfermita pordo.

Mi sciis, kio fariĝadis tiam en ŝia animo; mi sciis, ke post nelonga, kvankam turmentega, batalado ŝi en tiu ĉi momento sin donadis al la sento, kiun ŝi plu jam ne povis venki.

Subite ŝi leviĝis, rapide eliris la ĝardenon kaj sin kaŝis.

Pasis unu horo . . . pasis alia; — ŝi ne revenis.

Tiam mi levis min kaj, elirinte el la domo, direktiĝis laŭlonge la aleo, laŭ kiu, — mi ne dubis, — ŝi ankaŭ iris.

Cio mallumiĝis ĉirkaŭe; la nokto jam surmovis sin. Sed sur la malseka sablo de l' vojeto, purpuriĝante hele eĉ tra la disverŝita nebulo, estis vidata ia rondeta objekto.

Mi min klinis. Tio estis virga, apenaŭ ekburĝoniĝinta rozo. Antaŭ du horoj mi tiun ĉi rozon vidis sur ŝia brusto.

Mi gardeme levis la floron falintan en koton kaj reveninte la gastĉambron, metis ĝin sur la tablo, antaŭ ŝia seĝo.

Jen fine ŝi ankaŭ revenis — kaj trairinte per malmultepezaj paŝoj la tutan ĉambron, ŝi sidigis apud la tablo.

Sia vizaĝo kaj paliĝis kaj reviviĝis; rapide, kun gaja konfuzo kuradis flanke ŝiaj mallevitaj kvazaŭ malgrandigitaj okuloj.

Ŝi ekvidis la rozon, ekkaptis ĝin, ekrigardis ĝiajn ĉifitajn, malpurigitajn florfolietojn, ekrigardis min, — kaj ŝiaj okuloj, haltinte subite, ekbrilis per larmoj.

— Pro kio vi ploras? — demandis mi.

— Jen pro tiu ĉi rozo. Rigardu, kio el ĝi fariĝis.

Tiam mi pensis elmontri la profundsencan.

— Viaj larmoj delavos tiun koton, — diris mi kun signifa esprimo.

— Larmoj ne lavas, larmoj bruligas, — respondis ŝi kaj, turninte sin al la kameno, ĵetis la floron en la mortantan flamon.

— La fajro bruligas ankoraŭ pli bone ol larmoj, — ekkriis ŝi ne sen ia braveco, kaj la belegaj okuloj, brilantaj ankoraŭ de larmoj, arogante kaj feliĉe ekridis.

Mi komprenis, ke ŝi ankaŭ estis ekbruligita.

Tradukis el la rusa

A. Vejtcler.



KARA HUNDO.

(De A. Ceĥov.)

Leŭtenanto Dubov, fervora militisto, kiu jam ne estis en sia floraĝo, kaj memvolulo Knaps sidis kaj trinkis konjakon.

— Perfekta hundo! — diris Dubov montrante al Knaps sian bojanton Milko. — Rimarkinda hundo! Metu l' atenton je ĝia buŝego! Rigardu tiun ĉi buŝegon, mi vin petas! Se mi trovus amanton, li donus ducent rublojn por la sola buŝego! Vi ne kredas? Se vi ne kredas, vi nenion komprenas.

— Mi komprenas, sed . . .

— Gi estas sidhundo, pursanga angla seter! Mirindega teniĝo! Kaj la flarado — Dio, kia flarado! Ĉu vi scias, kiom mi pagis por Milko, kiam ĝi estis ankoraŭ hundido? Cent rublojn! Neordinara hundo! He, ci, Milko-fripono! Ci, malsaĝa Milko! Tien ĉi, tien ĉi, mia hundeto, mia hunĉjo!

Dubov tiris al si Milkon kaj kisis ĝin inter l' oreloj. Sur l' okuloj de la leŭtenanto ekbrilis larmoj.

— Mi cin donos al neniu, mia beleco, mia . . . kuraĝulo! Ci amas min, Milko, ci amas min? . . . He, for de mi! — subite ekkriis li. — Kun la kotaj piedegoj rekte sur l' uniformon! Jes, Knaps, mi donis cent kaj kvindek rublojn por la hundido! Sekve estis kaŭzo por doni ilin! Mi nur bedaŭras ke al mi mankas tempo por ĉasi. La hundo pereas pro nenifarado, ĝi enterigas sian talenton . . . Nur tial mi ĝin vendas. Aĉetu ĝin, Knaps! Vi min dankados daŭre tuta via vivo. Se vi ne havas ŝufiĉe da mono, mi, por vin plaĉi, cedas ĝin por duono . . . Prenu ĝin por kvindek. Rabu min!

— Ne, kara mia, — diris Knaps kun sopiro. — Se ĝi almenaŭ estus de vira sekso, mi, povas esti, aĉetus ĝin, sed . . .

— Kio? Milko ne estas de vira sekso? Knaps, kion vi havas? Milko ne estas de . . . vira sekso? Kio do ĝi estas laŭ via opinio? Hundino? Ha-ha! La knabeto ne povas diferencigi hundviron de hundino!

— Vi parolas kun mi kiel se mi estus blindulo aŭ infano. Certege, ĝi estas hundino.

— Nu, vi baldaŭ diros ke mi mem estas virino! Ha, Knaps, mia Knaps, ĉu por tio vi faris la plenan kurson de teknika koleĝo? Ne, mia kara, ĝi estas vera kaj pursanga hundviro! Gi ombrigus la plej belan hundon, kaj vi . . . de virina sekso! Ha-ha!

— Pardonu, Miĥail Ivanoviĉ, sed vi . . . vi kalkulas min simple . . . malsaĝulo . . . Tio ĉi ne estas ĝentile . . .

— Vidu tiun ĉi obstinulon! Nu, iru al la diablo . . . ne aĉetu ĝin! Vi ne estas komprenebla. Vi baldaŭ diros ke tio ne estas ĝia vosto, sed piedo . . . Mi ne petas vin aĉeti. Mi volis fari al vi komplezon, sed . . . Vahrameev, da konjako!

La servsoldato alportis ankoraŭ da trinkajo. L' amikoj plenigis siajn glasojn. Pasis silenta duonhoro.

— Hm . . . se ĝi estas eĉ de virina sekso . . . — ekdiris la leŭtenanto, malafable rigardante la botelon. — Cu tio ĉi ne estas via propra profito? Gi donos al vi hundidojn, kaj ĉiu hundido estas kvin kvinrubloj . . . Oni aĉetos ilin kun plezuro. Estas tute nekompreneble, kial hundviroj vin plaĉas! Hundinoj estas miloble pli preferindaj. La virina sekso estas pli dankema, pli ligiĝema . . . Nu, se vi tiel timas la virinan sekson, — bone, mi ĝin donas al vi por dudek kvin rubloj.

— Ne, ne, mia kara, mi donos nenion. Unue, mi ne bezonas hundon, due, mi ne havas monon.

-- He, tion ĉi vi devus diri antaŭ ĉio! Milko! for de tie ĉi!

La servsoldato alportis ovaĵon. L' amikoj atakis ĝin kaj rapide malplenigis la paton.

-- Vi estas bona kolego, Knaps, brava homo... -- diris la leŭtenanto, sekigante al si la lipojn. -- Mi bedaŭros, se mi estos vin tiel lasinta... Diablo! ĉu vi scias... prenu la hundon sen pago!

-- Sed kion mi faros kun ĝi, karulo? -- diris Knaps kun sopiro. -- Kiu ĝin fleegos ĉe mi?

-- Nu, ni lasu tion ĉi, mi ne persistas. Al la viablo! Se vi ne volas, mi ne persistas... Sed kien vi rapidas? Restu ankoraŭ iom.

Sed Knaps rektiĝis, oscedis, leviĝis kaj prenis sian ĉapon

-- Estas tempo, adiaŭ, -- li diris.

-- Atendu iom, mi vin akompanos.

Dubov kaj Knaps metis sur sin la supran vestaĵon kaj iris en la straton. L' unuaj cent paŝojn ili silentis.

-- Ĉu vi ne scias, al kiu mi povus doni la hundon? -- demandis la leŭtenanto. --

Ĉu vi ne havas tiajn konatojn? La hundo estas, kiel vi vidis, belega, de bona raco, sed mi... mi tute ne bezonas ĝin.

-- Ne, mia kara... kiajn konatojn mi povas havi tie ĉi?

Ĝis la loĝejo de Knaps l' amikoj diris nenian vorton. Nur en la momento, kiam Knaps ekpremis la manon de la leŭtenanto kaj malfermis la pordon, Dubov ektuŝis kaj diris maldecideme:

-- Diru, ĉu la defelistoj de tie ĉi akcept'as hundojn?

-- Mi pensas ke jes... sed mi ne scias ĝin kun certeco.

-- Mi sendos ĝin kun Vahrameev... ke ĝi iru al la diablo! Mi ordonos ke oni ĝin defelu... Abomena hundo! Malbenita besto! Al ĝi ne sufiĉas malpurigi la ĉambregon: hieraŭ ĝi formanĝis la tutan viandon, l' anatemita... Se ĝi ankoraŭ estus de nobla raco... Pesto! Inter ni -- bastardo de malpura hundo kaj de porko. Bonan nokton!

-- Adiaŭ! -- diris Knaps.

La pordo ekkrakis, kaj la leŭtenanto restis sola en la strato.

El la rusa trad. A. Kofman.



PLUVO.



(Hina fabelo.)

La filo de l' ĉielo, -- vivu lia nomo pli longe ol la mondo, -- la imperiestro *Li-O-A* staris apud la fenestro de sia porcelana palaco.

Li estis juna kaj tial bonkora. En la mezo de lukso kaj brilo li ne ĉesis pensi pri la malriĉaj kaj malfeliĉaj.

Falis granda pluvo. La ĉielo ploris, ploris ankaŭ la arboj kaj la floroj. Malgajo premis la koron de l' imperiestro kaj li ekkriis:

-- Malbone estas al tiuj, kiuj en tempo de l' pluvo ne havas eĉ ĉapelon; -- kaj turnante sin al la ĉambelano, li diris:

-- Mi volus scii, kiel granda estas la nombro de tiaj malfeliĉaj en mia urbo Peking.

-- Ho lumo de l' suno! -- respondis fleksinte la genuojn kaj klininte sian kapon Tsung-Hi-Tsang, -- ĉu estas io neeblo por la reĝo de l' reĝoj? Ankoraŭ ĝis la subiro de l' suno vi scios, ho patro de l' ĉielruĝo, kion vi volas!

La imperiestro ridetis afable, kaj Tsung-Ĥi-Tsang kuris tiel rapide, kiel li povis, al la ĉefa ministro San-Ĉi-San. Li alkuris apenaŭ spirante kaj en la rapideco eĉ ne faris ĉiujn honorojn, kiuj konvenas al ĉefa ministro.

— La ĝojo de l' mondo, nia plej favora sinjoro, — diris li apenaŭ spirante, — estas tre maltrankvila. Li estas zorgata pri tiuj homoj en nia urbo, kiuj ne havas ĉapelon en tempo de l' pluvo, kaj li volas scii hodiaŭ ĝis vespero, kiel granda estas ilia nombro.

— Jes, ekzistas sufiĉa nombro da sentaŭguloj, — respondis San-Ĉi-San, — cetere...

Kaj li ordonis alvoki la ĉefon de l' urbo Paj-Ĥi-Vo.

— Malbonaj estas novaĵoj el la palaco! — diris li, kiam Paj-Ĥi-Vo klinis la kapon al la tero en signon de l' atento, — la sinjoro de nia vivo rimarkis malordon.

— Kiamaniere? — kun teruro ekkriis Paj-Ĥi-Vo, — ĉu ne ekzistas la bela ĝardeno, kiu donas densan ombron kaj kovras la urbon de l' flanko de la palaco?

— Mi ne scias, kiamaniere tio ĉi okazis, — respondis San-Ĉi-San, — sed Lian Imperiestran Moŝton terure maltrankviligas tiuj sentaŭguloj, kiuj promenas en daŭro de pluvo sen ĉapeloj. Li volas scii ankoraŭ hodiaŭ, kiel granda estas ilia nombro en la urbo. Faru ordonojn.

— Alvoku al mi en momento tiun ĉi hundon Ĥuar-Dzung, — kriis Paj-Ĥi-Vo al siaj subordonitaj.

Kaj kiam la estro de gardantoj, tremanta pro la teruro, falis antaŭ li sur la teron, la mandareno faligis sur lian kapon akvofalon da malbenoj.

— Sentaŭgulo, fripono, malalta perfidulo! Ĉu vi volas, ke ni ĉiuj kune kun vi estu tranĉitaj en du partojn?

— Klarigu al mi la kaŭzon de via kolero, — tremante kaj batante sin sur la tero diris Ĥuar-Dzung, — ke mi povu kom-

preni tiujn ĉi konsolantajn vortojn, kiujn vi diras al mi.

— Vi estas maljuna hundo, al kiu konvenas gardi la porkojn, ne la plej grandan urbon en la mondo. La reĝo mem rimarkis malordon en la urbo; en la stratoj vagas sentaŭguloj, kiuj ne havas ĉapelon por kovri la kapon en tempo de l' pluvo. Ĝis la vespero sciigu min: kiel granda nombro da tiuj ĉi homoj ankoraŭ restos en la urbo.

— Cio estos farita akurate, — respondis Ĥuar-Dzung, batante la plankon per la frunto, kaj post unu momento li kriis kaj batis la teron per la piedoj antaŭ la gardantoj, kiuj estis kolektitaj per la surdigantaj sonoj de l' tamburo.

— Sentaŭguloj, mi pendigos unu duonon de vi kaj rostos la alian sur karboj. Tiel bone vi gardas la ordon en la urbo! Vi ne vidas, ke en daŭro de l' pluvo oni promenas en la stratoj sen ĉapeloj! Post unu horo ĉiuj, kiuj ne havas ĉapelon eĉ el kano, devas esti arestitaj.

La gardantoj kuris por plenumi la ordonon, kaj en daŭro de horo en la stratoj estis vera ĉasado. — Tenu lin! kaptu lin! — kriis la gardantoj kurante post la homoj, kiuj ne havis ĉapelon. Oni trenis ilin el ĉiuj lokoj, kie ili sin kaŝis, kiel la ratoj, kiujn persekutas la kuiristoj por fari el ili rostajon, kaj post unu horo sen unu minuto ĉiuj, kiuj ne havis ĉapelojn, staris en la korto de l' malliberejo.

— Kiel granda estas la nombro da ili? demandis Ĥuar-Dzung.

— 20871, — respondis la gardantoj, klinante sin ĝis la tero.

— Ekzekutistojn! — ordonis Ĥuar-Dzung. Kaj post unu duono de l' horo 20871 homoj ekzekutitaj kuŝis en la korto de la malliberejo. Iliaj kapoj estis fiksitaj sur stangoj kaj portataj en la urbo por la edifo de l' popolo.

Ĥuar-Dzung iris kun raporto al Paj-Ĥi-Vo, — Paj-Ĥi-Vo al San-Ci-San, — San-Ĉi-San al Tsung-Ĥi-Tsang.

Estis vespero. La pluvo finiĝis. La venteto tuŝis la arbojn, kaj la pluvo da diamantoj falis sur la bonodorantajn florojn, kiuj brilis per la fajreroj en radioj de l' subiranta suno.

La tuta ĝardeno estis brilanta kaj bonodoranta, kaj la filo de l' ĉielo Li-O-A staris apud la fenestro de sia porcelana palaco kaj rigardis kun plezuro la mirindan pentraĵon.

— Nu, mi volis ekscii, — diris la imperiestro turnante sin al Tsung Hi-Tsang, — kiel granda estas en Peking la nombro da homoj, kiuj ne havas ĉapelon por kovri la kapon en tempo de l' pluvo.

— La deziro de l' ordonanto de la mondo estas plenumita, — respondis kun profunda saluto Tsung-Hi-Tsang.

— Nu, kiel granda estas la nombro da ili? Diru al mi nur veron.

— En la tuta urbo ne ekzistas eĉ unu homo, kiu ne havas ĉapelon por kovri la kapon en daŭro de l' pluvo. Mi ĵuras, ke mi diras puran veron.

Kaj Tsung-Hi-Tsang levis la manojn kaj klinis la kapon en signon de la sankta ĵuro.

La vizaĝo de l' bona imperiestro ekbrilis per feliĉa rideto.

— Feliĉa urbo! Feliĉa lando! — ekkriis li, — kiel mi estas feliĉa, ke sub mia regado la popolo vivas tiel feliĉe!

Kaj ĉiuj en la palaco estis feliĉaj kun la feliĉo de l' imperiestro.

San-Ci-San, Paj-Hi-Vo kaj Huar-Dzung ricevis ordenojn de l' ora drako por la patraj zorgoj pri la popolo.

El la gazeto »Rusujo« tradukis

V. Laskin.



ANEKDOTOJ.

BONA PREDIKISTO.

La pastro tre amis kartan ludon kaj preskaŭ tutan sian liberan tempon pasigis en tiu ĉi ludo. Li ĉiam portis kartojn en la poŝo kaj uzis ĉian okazon por ŝermoniĝi al sia amata okupo.

Unu fojon, en la preĝejo li aperis sur la tribuno, por diri predikon al siaj paroĥanoj. Antaŭ ol komenci la predikon, li prenis el la poŝo tukan per purigi la razon kaj subite kun la tuko li eltiris el la poŝo kelke da kartoj, kiuj disflugis sur la planko de la preĝejo.

La paroĥanoj tre miregis kaj indignis. Sed la pastro ne konfuziĝis: li sin turnis al unu malgranda knabo kaj diris al li:

— Knabo, levu la trefan damon kaj donu al mi.

La knabo tuj kaptis la karton, kiun postulis la pastro kaj donis ĝin al li. Poste la pastro sin turnis al malgranda knabino kaj diris al ŝi:

— Knabino, levu la pikan reĝon kaj donu ĝin al mi.

La knabino ankaŭ bone plenumis la postulon de l' pastro.

Tiam la pastro laŭte kaj solene diris al la paroĥanoj:

— Jen, gepatroj, vi mem vidas, ke viaj malgrandaj infanoj, kiuj, kredeble, ankoraŭ ne scias eĉ unu plej mallongan preĝon, jam tre

bone scias diferenci kartojn. Kia do povas esti la sorto de tiuj ĉi infanoj? Sen observo kaj sen ĉia bona instruo ili de la plej frua infaneco, iom post iom konatiĝos kun diversaj malbonaj kaj pekaj okupoj, kiuj poste fariĝos kutimoj, ankoraŭ poste — pasioj kaj fine, tiuj ĉi malgrandaj infanoj paŝos sur tiun vojon, kiu kondukos ilin al vera pereco!

Kaj la pastro diris je tiu ĉi temo tian bonan kaj elokventan predikon, ke multaj parohanoj ploregis, aŭskultante lin, kaj ĉiuj ili konsente diris, ke ilia pastro estas la plej bona pastro kaj la plej bona predikisto.



NOBLA HISPANO.

Nobla hispano vojaĝis piedire. Nokte, en tre malbona vetero li venis al malgranda vilaĝa hoteleto kaj komencis frapadi ĉe la pordo.

— Kion vi bezonas? — kolere demandis lin la mastro de la hoteleto, malfermante fenestron.

— Mi bezonas lokon, por pasigi la nokton, — respondis la hispano.

— Kiu do vi estas?

La hispano komencis paroli sian longan titolon:

— Mi estas Don X — Y — Z de la N.

— Nu, mi ne havas lokon por ĉiuj tiuj ĉi sinjoroj, — diris la mastro de la hoteleto kaj fermis la fenestron.

Kaj la malfeliĉa nobla hispano, kun la longa titolo estis devigita daŭrigi sian vojaĝon.



TRI BONAĴ AGOJ.

Amerikanokomercisto venis en sian kontoron en tre gaja humoro.

Lia kolego rimarkis tion ĉi kaj demandis lin:

— Kial vi estas tiom gaja?

— Mi ĵus faris tri bonajn agojn per unu fojo, — respondis la komercisto.

— Kiel?

— Mi iris preter preĝejo kaj ekvidis malriĉan virinon, kiu tenis sur la manoj infanon kaj ploris. Mi demandis ŝin, pri kio ŝi ploras; ŝi respondis al mi, ke ŝi venis en la preĝejon por bapti la infanon, sed ne havas dolaron, kiun la pastro postulas de ŝi pro la bapto. Mi donis al ŝi dekdolaran bankbileton, por ke ŝi donu al la pastro unu dolaron pro la bapto kaj la restajn naŭ dolarojn alportu al mi. La virino tiel faris. Tiel mi per unu fojo atingis tri bonajn celojn: mi helpis malriĉan virinon, baptis infanon kaj akiris naŭ verajn dolarojn anstataŭ dek falsajn.



PUNITA FIERECO.

Vagonaro staris apud stacio kaj estis tute preta por forveturo. En vagono de unua klaso sidis brava milita generalo. Apud la vagono staris oficiroj, akompanantaj la generalon. Al la generalo venis fervoja servanto kaj diris:

— Via generala moŝto, en tiu ĉi vagono veturos estro de fervojo. Tio ĉi estas lia vagono. Tial mi humile petas vin, sidiĝu en alian vagonon.

— Kial do mi ne povas veturi en tiu vagono, en kiu veturos ia estro de fervojo? — fiere respondis la generalo. — Mi ne iros el tiu ĉi vagono.

Post kelke da tempo la servanto ree venis al la generalo kaj diris:

— Via generala moŝto, la estro de fervojo petas vin, iru en alian vagonon.

— Iru for! — diris kolere la generalo.
— Mi ne iros de tie ĉi.

La servanto foriris. — Eksonis la lasta signalo.

— Adiaŭ sinjoroj! — diris la generalo al siaj oficiroj.

— Adiaŭ, via generala moŝto! Feliĉan vojon, via generala moŝto! — respekte respondis la oficiroj.

— La vagonaro moviĝis kaj rapide forveturis; sed la vagono, en kiu sidis la generalo, restis sur la loko, ĉar ĝi estis dekroĉita, laŭ ordono de la fervoja estro.

La situacio de l' generalo estis neenviinda.



RAKONTO DE ĈASISTO.

— Mi havis mirindan hundon. Ĝia stomako povis digesti ĉion: kaj dermon, kaj lignon, kaj oston, kaj eĉ metalon. Unu fojon fariĝis tia okazo. Mi sidis en mia ĉambro, kaj apud miaj piedoj kuŝis la hundo. Subite, de la tablo ekfalis arĝenta rublo. La hundo tuj ekkaptis ĝin kaj forglutis. — Post kelkaj tagoj, tiu ĉi mia hundo, okaze estis mortigita en ĉasado. Mi, kompreneble, ekvolis vidi, kio fariĝis kun la arĝenta rublo, traglutita de l' hundo. Mi malkovris ĝian ventron, kaj vi prezentu al si: mi trovis tie nur 70 kuprajn kopekojn. Sekve, 30 kopekoj estis jam digestitaj!



DU FANFARONULOJ.

Germano renkontis konatan amerikanon kaj, interparolante kun li, komencis fanfaroni pri la sukcesoj de la germana industrio kaj tekniko.

— En nia lando, — diris la germano, — estas elpensita mirinda maŝino. Oni metas en tiun ĉi maŝinon vivantan porkon, movigas la maŝinon, kaj post kelke da minutoj oni ricevas ŝinkojn, kolbasojn kaj aliajn viandajn produktaĵojn, laŭ deziro.

— Nu, tio ĉi tute ne estas mirinda, — diris la amerikano. — En nia lando estas elpensita multe pli bona maŝino. Ĝi ankaŭ elvivanta porko, post kelke da minutoj, faras diversajn viandajn produktaĵojn, sed se tiuj ĉi produktaĵoj ne estas siatempe venditaj, oni ree metas ilin en la maŝinon, movigas la maŝinon kontraŭen, kaj post kelke da minutoj ree aperas vivanta porko.



VILAĜANOFILOZOFO.

En festa somera tago, post sata tagmanĝo, riĉa vilaĝano kuŝis en sia ĝardeno sub granda, maljuna kverko kaj tiel konsideris kun si mem:

— Jes, Dio faris ĉion tre prudente, sed io tamen estas sufiĉe stranga. Ekzemple, sur tiu ĉi grandega majesta arbo kreskas malgrandaj, mizeraj fruktoj, sed la kukurboj, tiuj ĉi grandegaj fruktoj, kreskas sur maldikaj, herbaj trunketoj. Estus multe pli konforme, se sur la kverko kreskus ne tiuj ĉi mizeraj fruktoj, sed la grandaj, dikaj kukurboj.

Subite ekblovis vento, kaj unu frukto l' kverko ekfalis kaj dolore batis la konsideratan vilaĝanon sur la nazo.

— Ho, — diris la vilaĝano, frotante la nazon, — kia fariĝus mia nazo, se de tia alteco ĝin ekbatus kukurbo! Dio faris tre bone, ke kreante la mondon, Li ne demandis mian opinion.



MALPROSPERO.

Malriĉa oficisto, loĝanta en la ĉefurbo, en la kvina etaĝo de grandega malbela domo, estis tre malĝojigita: lia juna edzino ĵus naskis al li du infanojn per unu fojo. Kion faros la malriĉaj geedzoj kun tiuj ĉi infanoj? Liaj rimedoj por la vivo estas nur en malgranda salajro, kiu apenaŭ sufiĉas por tio, ke la junaj geedzoj ne mortu de malsato. Krom tio, la juna edzino estis tre malforta kaj konsumita per la naskado kaj tute ne povis nutri la infanojn. Post mallonga konsilo, la junaj geedzoj decidis alporti sekrete ambaŭ infanojn al ia riĉa domo kaj nerimarkeble restigi ilin ĉe la pordo. Kvankam tiu ĉi ago estis tre malfacila kaj turmenta por la geedzoj, tamen ĝi estis tute neevitebla: alie, la infanoj mortos pro malsato aŭ pro malvarmo. La juna edzo rapideme vestigis, prenis la korbon, en kiu kuŝis la du malgrandaj hometoj, kaŝis tiun ĉi korbon sub la baskon de l' peltó kaj foriris el hejme. Li iris sur la strato maltrankvile kaj timeme, kvazaŭ li irus por fari ian grandan krimon. Jen, li venis al la pordo de ia riĉa domo, singardeme eniris en la koridoro, metis sur la plankon la alportitan korbon kaj jam volis foriri. Subite fortega kortisto kaptis lin je la kolumo kaj kolere ekkriis:

— Ha, fripono! Mi jam longe atendas vin. Vi, kredeble, sin okupas per disportado de sekrete naskitaj infanoj. Kredeble, vi alportis tien ĉi ankaŭ tiun infanon, kiun mi ĵus rovis en tiu ĉi koridoro. Prenu tuj ĉiujn tri infanojn kaj foriru de tie ĉi, aŭ mi kondukos vin en la policon.

La malriĉa oficisto longe ĵuris, ke li alportis nur du infanojn, kiuj estas liaj propraj idoj, kaj ke li neniam sin okupis per disportado de sekrete naskitaj infanoj: sed la severa kortisto estis neelpetebla: li devigis la

malriĉan oficiston preni ĉiujn tri infanojn kaj foriri. Tiel, la malriĉa oficisto anstataŭ liberigi sin de du siaj propraj infanoj, ricevis trian, fremdan.

Kiel li estis renkontita de sia edzino, kaj kion li faris plu kun ĉiuj tiuj ĉi infanoj, mi jam ne scias.



FIERA POLO.

Malriĉa polo ĉiutage venadis en preĝejon kaj longe preĝis pri io, antaŭ granda figuro de Kristo. Li ĉiam preĝis longe kaj fervore, kun fleksitaj genuoj kaj kun larmoj en la okuloj. Li mallaŭte ripetadis ion kaj laŭte ĝemis. La preĝeservanto tre ekvolis scii, pri kio tiel fervore preĝas la malriĉa polo. Jen, la servanto sin kaŝis post la figuro de Kristo kaj komencis atendi, kiam la malriĉa polo venos kaj komencos sian preĝon. Jen, venis la polo. En la preĝejo krom li kaj krom ia kaŝita servanto neniu estis. La malriĉa polo, laŭ kutimo, staris sur la genuojn antaŭ la figuro de Kristo, tere salutis ĝin kaj komencis preĝi. Li longe preĝis, kaj la kaŝita preĝeservanto aŭdis, ke la polo, inter aliaj vortoj de la preĝo ofte ripetadis kun profunda sento:

— Sinjoro, donu al mi riĉecon! Donu al mi riĉecon, Sinjoro!

— Mi ne donos al vi riĉecon, — diris subite la preĝeservanto, respondante la peton de la malriĉa polo.

La malriĉa polo miregis kaj ektimis, sed, laŭ la simpleco de sia kredo, ekpensis, ke Kristo mem fine ekaŭdis lian fervoran preĝon kaj respondas al li. Tiu ĉi respondo, tamen, tre malĝojigis la malriĉan polon kaj li mallaŭte demandis:

— Kial do Vi ne donos al mi riĉecon, Sinjoro?

— Tial, ke vi estas malsaĝulo! — ree respondis la voĉo el post la sanktfiguro.

La malriĉa polo ekkoleris kaj severe diris al la sanktfiguro:

— Sinjoro, Vi povas doni aŭ ne doni al mi riĉecon, — sed Vi ne devas nomi min malsaĝulo.

— Kial do mi ne devas nomi vin tiel? demandis la voĉo el post la sanktfiguro.

— Tial, — respondis la malriĉa polo, — ke mi estas nobelo de antikva eminenta gento, kaj Vi estas nur hebredo.

Kaj la malriĉa polo majeste foriris el la preĝejo.

M. S. Rakitski.



Silent'! ĝi estas grand-sekreto.

El Meklenburga idio:mo

Se mallaŭtete flu' parolas kun alfluc,
Ĝi estas certe son' kaj voĉ' pri ama ĝuo,
Ĉar kiam ond' al ond' alfluas kun brueto,
Mi aŭdas tuj: »Silent'! ĝi estas grand-sekreto!«

Se kun la foliar' parolas vent' vespera,
Ĝi estas nek babil' nek simpla bru' aera,
Ĝi estas dolĉparol', ĝi estas ama peto,
L' eterna kant': »Silent'! ĝi estas grand-sekreto!«

Jen en la birda nest' sur ulma la kupolo
Aŭdiĝas dolĉa pep', mallaŭta dolĉparolo.
Ŝajniĝu kiom ajn, mi konas vin, birdeto,
Mi aŭdas ja: »Silent'! ĝi estas grand-sekreto!«

La floroj ĉirkaŭ mi sin ankaŭ ne detenas
Kaj interplektas sin, kun am' sin ĉirkaŭprenas,
Kaj inter la odor' aŭdiĝas dolĉkiseto
Kaj murmuret': »Silent'! ĝi estas grand-sekreto!«

Nur via kor', bel-roz', pro kio ĝi obstinas?
Pro kio via buŝ' al mia sin ne klinas? ...
En ĉio estas am', en ĉio, dolĉ-koreto,
Ho venu, sed — silent'! ĝi estas grand-sekreto.

Trad. G. Schroeder kaj A. Kofman.



VIRINO.

(Hinda legendo.)

En antikvaj tempoj Dio kreis la mondon kaj la viron, sed kiam li ekvolis krei la virinon, li vidis, ke la tuta fortika materialo jam estis uzita por la kreo de l' viro. Tiam Dio prenis la rondecon de la luno, la flekseblecon de la serpento, la kroĉemecon de la rampantaj kreskaĵoj, la maldikecon de la kano kaj

la ve'urecon de la floroj, la malpezecon de la folioj, la rigardon de la cervino, la gajecon de la radio de l' suno, la larmojn de la nubegoj, la malkonstantecon de la vento kaj la timemecon de leporo, la vantecon de la pavo, la molecon de lanugo kaj la fortikecon de diamanto, la dolĉan guston de mielo kaj

la kruelecon de tigro, la varmegon de la fajro kaj la malvarmon de la glacio, la babilemcon de alaŭdo kaj la delikatecon de kolombo. Li unuigis tiujn ĉi elementojn, kreis la virinon kaj alkondukis al la viro. Post unu semajno la viro venis al Dio kaj diris:

— Sinjoro, la ekzistaĵo, kiun vi donis al mi, venenas mian vivon: ŝi babilas senĉese, prenas la tutan mian tempon, ploras sen seriozaj kaŭzoj, konstante estas malsana. Mi venis al vi por vin peti, ke vi prenu ŝin, mi ne povas vivi kun ŝi.

Kaj Dio prenis la virinon, — sed post unu semajno la viro ree venis al Dio kaj diris:

— Sinjoro, mia vivo estas malgaja kaj izolita, post ke mi prenis de mi tiun ĉi ekzistaĵon. Mi ĉiam memoriĝas ŝian kanton, siajn rigardojn, ŝiajn ĉirkaŭpreojn.

Kaj Dio redonis la virinon al la viro. Tamen ne pasis ankoraŭ tri tagoj, ke la viro ree venis al la trouo de Dio.

— Sinjoro, mi vidas nun, ke la virino kaŭzas al mi multe pli da suferoj, ol da ĝojoj. Mi petas vin, prenu ŝin de mi.

Sed Dio kun kolero ekkriis:

— Iru for kaj faru kiel vi scias.

— Mi ne povas vivi kun la virino, — ripetadis la homo.

— Sed vi ankaŭ ne povas vivi sen ŝi, — respondis Dio.

Kaj la homo plorante ekkriis:

— Ho, mi malfeliĉa! tio ĉi estas vera, mi ne povas vivi kun ŝi kaj mi ne povas ankaŭ vivi sen ŝi!

El la gazeto »Sankt-Peterburgo« tradukis

V. Laskin.



DIVERSAĴOJ.

Adresaro de niaj abonantoj 1900.

(Daŭrigo.)

Francujo:

360. L. Démarest, instruisto, en Pierrefonds, Oise.
361. Groupe Espérantiste (Grupo Esperantista) en Dijon.

La manko de Kroniko. Ĉar al ni absolute mankis la tempo ĉirkaŭlabori la al ni ensenditajn manuskriptojn, — kaj, ĉar ni rapidis tre baldaŭ pretigi kaj dissendi tiun ĉi numeron, tial ni estas devigitaj la rubrikon »Kroniko« prokrasti por la venonta (1/1901) numero, kiu eliros post du semajno.

Kun tiu ĉi numero ni dissendas la titolpaĝon kaj tabelon de la enhavo por la jarkolekto 1900 de nia gazeto. Nia nuna numero ampleksas dudek paĝojn kune kun tiu ĉi aldono.

— **Malfacilaŭdemeco.** Riĉa Sinjorino, kiu estis kuracita per la Artaj Oreltamburoj de D-ro Nicholson, donacis al la Instituto la sumon da **Kr. 25,000**, por ke surdaj aŭ malfacilaŭdemaj personoj, kiuj ne havas la rimedojn akiri tiajn, ricevu ilin senpage. — Leterojn oni volu adresi al: *Instituto Nicholson, »Longcott«, Gunnersbury, London, W.*

Rebusojn ni ne presas en tiu ĉi numero.

Solvoj de la rebusoj trovataj en la n-ro 9: I. Apostrofo (*a* post *r-o f-o*). — II. Antaŭparolo (antaŭ »paro« *l-o*). — III. La vorteto *ne*.

Solvoj de la rebusoj trovataj en la n-ro 10—11:
I. Proverbo. — II.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos.

III. Akra, kvar, ravi, ario.

Ĝustajn solvojn ensendis: Sinjorino Caroline
Wieslander, Fernand Chaufoureaux, Ludoviko Mihalovich,
X. Y. Z., I. E. Moskovčenko kaj N. Studenov.

HUMORAĴO.

Vane. — La grafo: Mi aŭdis, ke vi pasigas
vian tutan paŭzan tempon en drinkejo.

La lakeo: Jes, via grafo moŝto; mia amatino
fariĝis malfidela, kaj nun mi serĉas *konsolon* en la drinkado.

La grafo: Kaj kiel longe daŭros ankoraŭ tiu
ĉi vivmaniero?

La lakeo: Ho, mi estas *nekonsolebla!*

Delikata rifuzo. — Ha, mia amata edzo, se vi
aĉetus por mi tiun ĉi juvelon, mi fordonus dek jarojn
el mia vivo.

— Sed via vivo estas multe pli kara al mi...

Neesperebla okazo. — Junulino interparolas kun
maljuna fraŭlino.

— Vi do neniam intencas edzinigi? — demandas
la junulino.

— Neniam!

— Eĉ tiam ne, se iu vin svatus?

— Tiam? ... Vere, pri tiu ĉi okazo mi ne pen-
sis ankoraŭ

Intenco. — Vi do edzigos, kaj nun la trian fojon.
Kaj vi volas edzinigi je la tria fratino Landau.

— Jes, amiko.

— Sed vi vivis ja malpace kun viaj du antaŭaj
edzinoj. Kial do vi edzinigos ankaŭ je la tria fratino?

— Mi pensus, ke plej bone estus *detru* la tutan
Landau-familion.

Informejo de la Administracio. — K. B. (Stavropol.) La
3-an, 7-an, 8-an kaj 9-an ni presos. Je la alia demando vi trovas
respondon sur la p. 174 en tiu ĉi numero.

A N O N C O J .

Signetojn Esperantistajn mi pretigas nun nur el arĝento kaj kostas la
ekz. rubl. 1.50 sen transsendo *Signetojn el kupro mi ne pretigas pli.*

Juvelisto **H. ŜTALBERG**, **Vezenberg** (Estl. gub.) Rusujo.

Ĉe la **Klubo Esperantista** en *Up-
sala* estas aĉeteblaj:

Jarlibro Esperantista 1897, eldonita de la
Societo *Espero* en S. Peterburgo. Kostas 1 frankon.

Libro de l' Humoraĵo, de *Paul de Lengyel*.
Tre rekomendinda verko, precipe uzebla kiel
ekzerca lego de komencantoj. Kosto 3 frankoj.

Finlandaj esperantistoj,

kiuj intencas akiri amatorajn fotografiajn aparatojn, estas petataj observi, ke tiaj, kune kun necesaj hemiaĵoj kaj uziloj, estas akireblaj ĉe ni je moderaj prezoj, krom kio al esperantistoj estas permesata rabato da 5%.

Postulu kostotabelojn!

Jyväskylä Rohdoskauppa
en Jyväskylä.

Esperantistoj!

Disvastigante la konadon pri Esperanto oni akcelas la tutan aferon Esperantan. Unu maniero estas uzi ĉiam propagandajn kovertojn. Tiaj en sveda lingvo estas riceveblaj en **Svedujo** ĉe la Klubo Esperantista Upsala, en **Finlando** ĉe s-ro Aug. Th. Laurén en Jyväskylä, kaj kostas nur

kr. 1.— (Fmk. 1:40 p.)

po 100, — al kio sin a'metas la poŝtopago.

RESTANTAJ JARKOLEKTOJ de la
»Lingvo Internacia« 1899 (malgranda nombro) estas riceveblaj ĉe mi. — Kosto: svedaj kronoj 1.50 = frankoj 2.—

Hjalm. Bäckström, Örnköldsvik (Suède).